# *Kuba prezidento akceptis italajn entreprenistojn kaj elstarulojn*



**Díaz-Canel kaj italaj entreprenistoj**

Havano, a?g 31 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel, kunvenis ?i-merkrede en la Palaco de la Revolucio, kun kelkaj entreprenistoj kaj elstaruloj de Italio por pli fortigi la rilatojn inter amba? landoj.

La italaj reprezentantoj esprimis la gravecon de la amikeco inter amba? landoj kaj asertis sian volon trovi solvojn por kontribui.

La kuba ?tatestro dankis pro la helpo kaj solidareco al Kubo, dum la ?efministro Manuel Marrero ratifis ke la aktualigo de la ekonomia kaj socia strategio de la insulo prikonsideras la eksterlandan partoprenon, kaj

tial Kubo restas malferma por a?skulti proponojn.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/298174-kuba-prezidento-akceptis-italajn-entreprenistojn-kaj-elstarulojn

Radio Habana Cuba